# ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA
15-a jaro, n-ro 42(2021:1)

*Karaj legantoj,*

*En la ĵus finiĝinta jaro atingis vin nur du numeroj de la revuo, malkiel planite. Kulpis malfacilaĵoj pro la korona viruso, reorganiziĝoj en la Afrika Komisiono kaj aliaj ĝenaj cirkonstancoj kiujn ne eblis tuj solvi.*

*Komenciĝis nova jaro, ni daŭrigas nian formikan laboron por diskonigi, ŝatigi la internacian lingvon Esperanto al afrikanoj kaj kontribui al la vigligo de la enkontinenta movado. Estas teama laboro kaj dankon al ĉiuj kunlaborantoj, kiuj jam helpas en la pretigado de la kampanjo por disvastigi la afiŝojn kaj proponi Esperanton pli aktive en sociaj retejoj, al amaskomunikiloj kaj altlernejoj tra multegaj landoj. Semon post semo disfloros nia hejmkontinento verde.*

*Restas deziri, ke la nova jaro 2021 alportu pli da trankvilo, sukceso kaj agrablaj surprizoj al vi kaj viaj familianoj. Fartu bone, restu sana kaj vivu feliĉe!*

***La redakcio***

*****************

## Informa agado de la Afrika Komisiono

La Afrika Komisiono estas en aktiva informa kampanjo tra afrikaj landoj kun aparta atento al Siera Leono, ĉar tie loĝas kunlaboranto. La klopodoj progresas glate, por realigi la ambicion disvastigi kaj semi laŭeble baldaŭ en ĉiu angulo de la kontinento la tutmondan lingvon Esperanto.

Konkrete, kun la helpo de kunlaborantoj ni produktis en du-tri laborlingvoj de afrikaj landoj informajn materialojn (afiŝojn, informilojn k.s.), kiujn ni afiŝas en la ekstermovadaj sociaj retejoj, sendas al universitatoj, lernejoj kaj amaskomunikiloj, kies kontaktinformojn ni antaŭe kolektis.




*La situacio pro la malsano de korona viruso devigas nin provi disvastigi kaj ekinstrui Esperanton en Afriko ekster ĉeesta klasĉambra instruado,* opinias membro de la komisiono. Kaj *la klasika ĉeesta kurso povus okazi en universitato - post la epidemio,* aldonis la kunlaboranto en Sieraleono.

La kampanjo fakte disvolviĝas sub la superrigardo de la grupeto zorganta pri informado ĉe UEA, kunlabore inter la estaranoj So Jinsu, Jérémie Sabiyumva kaj la Afrika Komisiono, instanco kreita komence de la 2000-a jaro kun la tasko disvastigi fakte Esperanton en Afriko kaj laŭbezone konsili pri la kontinento.

**Adjévi Adjé**

# KER-ekzamenoj en Afriko

La 28-an de novembro 2020 estis la naŭa Tutmonda Tago de UEA-ekzameno laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Sepdeko da kandidatoj en 12 urboj de 9 landoj de 4 kontinentoj partoprenis tiun tutmondan sesion, sub la elstara organizo de Katalin Kovats, redaktoro de *https://edukado.net.*

Unuafoje disvolviĝis en Afriko, precize en Kotonuo, Benino, tia ekzamen-sesio dank' al Mireille Grosjean. Ekzameniĝis tiutage ĉe la niveloj B1 kaj B2 en la hotelo JoCa entute kvar beninaj esperantistoj, nome s-roj Cyprien Guiya, Goby A. Ahonon, Aubain Cocouvi Ekon kaj François Hounsounou.

*Por mi estis provo por spertiĝi. La ekzameno disvolviĝis en similaj kondiĉoj kiel la ŝtatekzamenoj en Benino. Mi tutkore dankas al Katalin Kovats kaj Mirejo Grosjean, kiuj proponis tiun ŝancon al Afriko,* skribis la kandidato François Hounsounou.




La 4 kandidatoj de la unua KER-sesio en Afriko

Pro tio, ke la KER-ekzameno konstruiĝis surbaze de la eŭropaj normoj, ĝian atestilon oni oficiale agnoskas kaj traktas kiel la aliajn lingvoekzamenajn diplomojn.

# SEminario por VIrinoj kun enkonduko al E-o en Benino

La kerna kaj tuj aplikota instruo de tiuj seminarioj estas la preparo al akiro de laborposteno: verkado de kariertabelo kaj motivadletero, sinpreparo al dungcela intervjuo. En la lasta tago la staĝulinoj povas per rolludo trapasi dungcelan intervjuon kaj ricevi analizon de sia sinteno okaze de tiu tikla momento.

Aldone el tiu grava kaj tuj bezonata parto venas enkonduko al Esperanto.



Kelkaj el la SEVI-partoprenintoj

La NRO Scio Sen Bariloj (SSB) povis starigi tian plensemajnan seminarion: SEVI 4 de la 15-a ĝis la 21-a de novembro en la kulturcentro JoCa en Kotonuo, kaj tritagan seminarion: SEVI 5, de la 9-a ĝis la 12-a de decembro samloke. 13 kaj 8 partoprenantinoj gastis en tiu loko kaj ricevis la eblon sekvi la eventon. Instruis kiel kutime Privas T., prez. de SSB, kaj Mireille G.

Tiuj staĝoj estas senpagaj por la beninaj junulinoj, kiuj plie ricevas hotelrestadon dum la evento. Tio eblas pro la malavara subteno de mecenatoj. Tio vekas misfidon ĉe kelkaj gepatroj kaj ni eksciis, ke diversaj kandidatinoj ne aperis pro malpermeso fare de la gepatroj. Estontece ni devos sugesti, ke la gepatroj venu en la akcepta unua vespero por konatiĝi kun ni kaj vidi la lokon, kie ilia filino restados kaj studos. Eĉ se la staĝulinoj estas en la aĝo inter 18 kaj 30, la gepatroj atentas multe kaj ektimas facile. Pluraj partoprenantinoj agnoskis, ke ili devis lukti ĝis ili konvinkis siajn gepatrojn, ke tia partopreno estos pozitiva por ili.

**Mireille Grosjean**

# Uvira dankas siajn donacintojn...

Komence de la dua trimestro de la jaro 2020 fotoj, videoj kaj novaĵoj pri terura katastrofo en Uvira, nordoriente en DR Kongo, estis montrataj en la reto, kaŭzante tiel elanon de solidareco tra la mondo.

Responde al helpalvoko de la Afrika Komisiono kaj la estraro de UEA, esperantistoj donacis monon pere de la konto *Espero*, sumon kiu poste estis sendita al la viktimoj en Uvira.

Sosthe Emmanuel kaj Ramazani Amisi Nanjira, respektive la prezidanto kaj sekretario de la Uvira Esperanto-klubo, ricevintoj kaj distribuintoj de la mono al ĉiuj viktimoj, per raporto konfirmis la ricevon de kolektita mono kaj ĝian distribuadon: *Estis la 3-a de julio 2020 kiam ni ricevis la monsumon de 850 USD por distribui surloke al 17 esperantistoj uviraj, trafitaj de la inunda katastrofo. Tiun ĉi monsumon ni pace kaj libere distribuis surloke.* Kaj ili diras: *Ni uviranoj dankas elkore vin ĉiujn kiuj montris viajn subtenon kaj solidarecon al ni, dum la malfeliĉa katastrofo kiu trafis nin".*

La transpagon de la mono de UEA al Uvira plenumis E-o Plus *https://mallonge.net/8x*. La iniciatintojn de tiu ĉi asocio, nome Jean-Pierre Marcq kaj Evelyne Rotellini, UEA honoris per diplomo de Elstara Agado por Esperanto dum la fermo de la Virtuala Kongreso de E-o, 8-a aŭg 20.



Sosthe Emmanuel



Ramazani Amisi Nanjira

# John Magessa: mi agadis pro mia amo al Esperanto

**John Magessa, konata tanzania e-isto, prezidanto de la loka Esperanto-Klubo MEK, prezidanto de la ĵus oficiale akceptita TEJO-sekcio de Tanzanio kaj sekretario de la tanzania movado (TEA), profesie instruisto, iĝis dum la Virtuala Kongreso de Esperanto 2020 unu el la diplomitoj de UEA pri Elstara Agado. Bv. ekkoni liajn opiniojn kaj perspektivojn por sia aktivado.**

*Saluton kaj gratulon pro la diplomo Elstara Agado de UEA. Kia estis via sento, kiam vi eksciis, ke UEA diplomis vin pro via agado en Tanzanio?*

Saluton kaj dankon, kara. Mi sentis ĝojon pro tiu honorigo. Fakte estis subita informo sendita de mia eksterlanda amiko, ke mi estas honorigita de UEA per diplomo. Li kutime gratulis min pro mia filmeto "Tanzanio kiel turisma lando" kaj miaj Esperanto-aktivaĵoj ĉe mia lernejo kaj en Tanzanio ĝenerale, dum mi ne sciis, ke mi povos ricevi honorigon per diplomo, ĉar mi agadis nur pro mia amo al Esperanto.

*Ĉu vi povas diri en kelkaj vortoj konkretajn agadojn, kiujn vi faris kaj faras por la movado en via lando?*

Mi regule instruas E-on ĉe la ŝtata mezlernejo Kaigara ekster la oficialaj kursprogramoj al interesataj gelernantoj. Krom mia filmeto pri mia lando, dum la pasinta jaro mi organizis

futbalajn matĉojn en la lernejo nome de la E-Klubo (MEK), celante sproni al lernemo aparte ĉe knabinoj. La aranĝo maksimume altiris kaj knabojn kaj knabinojn. Ĝi estis finance subtenita de Angelo Aquillos el Hispanio.



Futbala Esperanto-teamo

Kaj kiel la prezidanto de la tanzania junulara organizo kaj kunlabore kun aliaj gvidantoj, ni sukcesis revigligi la junularan sekcion kaj ĉi-jare formale akiris aliĝon ĉe TEJO. Same, kiel la provizora sekretario de la landa asocio kaj kune kun aliaj asociaj gvidantoj, ni sukcese okazigis nacian renkontiĝon por revigligi la asocion, kiu nun survojas al registriĝo ĉe publika instanco en Tanzanio.

*Vi ĉeestis en kelkaj programeroj dum la Virtuala Kongreso (VK) de Esperanto; ĉu vi povas diri pri iu(j) el tiuj programeroj, kiu(j)n vi plej ŝatis?*

Mi tre ŝatis la prelegojn pri varbado, ĉar mi gajnis novan sperton pri tio, kiel aliaj asocioj ekster Tanzanio funkcias, por helpi plifortigi la Tanzanian Esperanto-Asocion.

*Tanzanio ĵus akceptiĝis kiel aliĝinta sekcio de TEJO, kiel vi kaj viaj kunlaborantoj ricevis tiun novaĵon? Kaj kiuj estas la estraranoj kaj la venontaj paŝoj/planoj de la ĵus formale aprobita TEJO-sekcio en Tanzanio?*

Ni ĝoje ricevis la novaĵon ĉar ekde 2017 ni baraktis por membrigi nian asocion ĉe TEJO sensukcese. La nuna estraro konsistas el John E. Magessa, prezidanto; Paul Kusaya, sekretario; Deus Bihigi, kasisto, kaj Baraka Mohamed, estrarano pri informado.

Nia junulara organizo planas multajn agadojn en la estonteco, i.a. instruadon de la lingvo, fondon de infana ĝardeno.

*Ĉu la UEA-estrarano pri Afriko kaj Afrika Komisiono povus helpi por la agado en Tanzanio? Se jes, kio devus esti la rolo de UEA en Tanzanio, laŭ via opinio?*

Jes ja! Pro la fakto ke Tanzanio estas sub la Afrika Komisiono kaj estas landa sekcio de UEA, UEA kaj la Afriko Komisiono devas kunlabori kun Tanzanio por sukcesigi planojn kaj agadojn de tanzaniaj esperantistoj.

*Kiuj estas viaj impresoj pri la Tago de Afriko? En kio la venontaj Afrikaj Virtualaj Esperanto-Kunvenoj estus plibonigindaj aŭ eĉ plibonigendaj?*

Mi tre ŝatis la Afrikan Tagon, ĉar multaj alikontinentanoj povis partopreni en ĝi kaj ĝue malkovri, ke afrikanoj povas kune fari ion bonan pri sia kontinento. Sed venontfoje pli da afrikanoj povu partopreni la renkontiĝon.

*Ĉu vi havas ion apartan por diri al la legantoj de "Esperanto en Afriko"?*

Mi emas danki al ĉiuj, kiuj legas ĉi tiun interparolon kaj kredas ke nun Tanzanio kaj Afriko ĝenerale iras en ĝusta direkto.

Mi petus ankaŭ la estraron de TEJO regule organizi virtualajn kunvenojn por fortigi la kapablojn de junuloj tra la mondo, des pli ke multaj el ili ne povas vojaĝi eksterlande pro diversaj kialoj.


John E. Magessa (dekstre) kun kolego

# Afriko kadre de la Monda Fest' 2020 de UEA

La Tago de Afriko, okazinta la 23-an de aŭgusto 2020 kadre de la MondaFest' de UEA dum ĉ. 7 horoj, estis la plej granda virtuala E-evento iam ajn okazinta en Afriko. 131 homoj el 46 landoj de 4 kontinentoj oficiale aliĝis al la kongreso: 18 afrikaj landoj, 16 eŭropaj landoj, 6 aziaj landoj kaj 5 amerikaj landoj.

Ĉio komenciĝis per vivaj kantoj de burundaj infanoj el la infanĝardeno "Espero" sub la gvido de Gilbert Niyukuri, kaj kunspekto de kantoj de Joël Muhire. La oficiala malfermo okazis per prezento de la programo kaj la libreto pri la Afrika Tago fare de Adjévi Adjé. Sekvis bonveniga mesaĝo de Costantine Mashauri nome de Afriko, muzikaĵo de la grupo Konga Espero, salutvortoj de la vicprezidanto de UEA Fernando Maia Jr., mallonga prezento de la membroj de la Afrika Komisiono kaj parolado de Jérémie Sabiyumva, estrarano de UEA pri Afriko.

Heidi Goes montris lumbildan prezentadon pri siaj agadoj en Angolo, kun la muziko *Esperanto ĉiam* de Abel Massiala. Sekvis mallonga prezento de agadraportoj: el Burundo de la prezidanto Aimé-Patrick Manirakiza, Ganao de Alfred Kobina Arthur, Benino pri la agado de la NRO SSB de Mireille Grosjean, Gvineo de Alpha Ahmed Diallo, Madagaskaro de Rasoharinaivo Mioranantenaina, Kameruno de Nguefack Zedong Chamberline, Senegalo de Lafi Charles Diatta kaj Assane Faye, Tanzanio de John E. Magessa kaj fine video-raporto de la Afrika Komisiono. Tiu parto fermiĝis per salutvortoj de la prezidanto de UEA, d-ro Duncan Charters.

La alia parto estis same riĉa kaj alloga. Byelongo Elisée I., per sia prezento pri la svahila lingvo instigis viglan interbabiladon ĉe kelkaj ĉeestantoj, sed pro manko de tempo la interesatoj pri la temo ne povis sufiĉe komenti ĝin. Necesis tuj montri la 9-minutan reklam-filmon de John E. Magessa pri Tanzanio (*https://mallonge.net/65*), ĉe kies fino seninterrompe prelegis Apélété D. Agbolo pri la evea. Menciindas, ke intertempe okazis ankaŭ prezento de popola danco el Burundo. Eblas ankoraŭ spekti tiun folkloraĵon el Burundo per *https://mallonge.net/64*. Ĉe la sama jutubo-kanalo kuŝas ankaŭ aliaj materialoj montritaj dum la Tago de Afriko.

Sekvis la afrika forumo, dum kiu estis kolektitaj demandoj, proponoj por pli efika funkciigo de la Afrika Komisiono. Poste Trezoro Huang Yinbao, vicprezidanto de UEA, parolis pri sia libro *70 jaroj de UNESKO* kaj alvokis la afrikajn tradukemulojn traduki ĝin en sia nacia lingvo.

La tago atingis sian sukcesan kulminon, kiam Costantine Mashauri prezentis Tanzanion kiel potencialan gastiglandon de la UK post 3 jaroj. Ankaŭ Senegalo estis faronta similan prezenton... Mallonge, oni esperas, ke la UK 2024 povos okazi en Afriko kaj ke ĝis tiam la tuta terglobo inkluzive la afrikajn landojn estos pli bone sendrate retkovrita ol nun, tiel, ke la ne vojaĝemaj esperantistoj povos ankaŭ de sia loĝloko virtuale partopreni tiun UK.

La Tago de Afriko fermiĝis per la dankoj de la estraranoj de UEA al la organizantoj kaj ilia subteno al la afrika movado. La renkontiĝo respekteblas per *https://mallonge.net/5y* kaj ĝia programa libro elŝuteblas per *https://mallonge.net/90*.




# Libreto pri la Tago de Afriko

**Adjévi Adjé: *Libro pri la Tago de Afriko*. Lomeo: Afrika Komisiono de UEA, aŭguste 2020. 32 paĝoj, 21cm. [PDF-dosiero elŝuteblas tie ĉi senpage].**

Adjévi Adjé estis la ĉefa organizanto de la Tago de Afriko kadre de la Monda Fest' 2020 de UEA en la 23-a de aŭgusto. Por informi pri tiu tago kaj pri la Esperanto-agado en Afriko, li kompilis la libron *Libro pri la Tago de Afriko*.

En la libro aperas prezentoj pri la membroj de la Afrika Komisiono de UEA, mallongaj raportoj pri la agado de tiu komisiono kaj ankaŭ pri la landaj asocioj, kluboj kaj unu-opuloj en Angolo, Benino, Burundo, Centra Afriko, Demokratia Respubliko Kongo, Ganao, Gvineo, Kameruno, Kenjo, Madagaskaro, Senegalo, Tanzanio kaj Togolando. Krome estas la programo de la Tago de Afriko, kaj listo de ĉiuj homoj, kiuj enskribiĝis por partopreni en tiu tago.




*Libro pri la Tago de Afriko* enhavas ankaŭ informojn pri afrikaj Esperanto-libroj kaj diskoj. La redaktinto skribis: *cetere, mi devas konfesi, ke ni havis iom da problemoj por elekti la prezentotajn afrikajn artaĵojn. Kial? Ĉar la produktaĵoj pri Afriko kaj de afrikanoj, kvankam relative nekonataj en la E-medio, prezentas multajn allogajn titolojn. Ili ĉiuj estas konindaj, legindaj, aŭskultindaj kaj spektindaj por ĉiuj esperantistoj almenaŭ unu fojon en la vivo. Tra la hodiaŭa programo ni proponas al vi nur parteton de la afrika kultura heredaĵo kaj aparte malgrandan liston de la afrikaj Esperanto-libroj kaj diskoj, kies plimulto mendeblas ĉe la Libroservo de UEA.*

Kun antaŭparolo de la UEA-estrarano Jérémie Sabiyumva kaj enkonduko de la redaktinto mem, *Libro pri la Tago de Afriko* estas kolore ilustrita kaj verkita en simpla stilo per facila lingvaĵo. Se vi interesiĝas pri Esperanto en Afriko, nepre legu ĉi tiun libron, ĉar ĝi helpos al vi ekhavi ideon pri la nuntempa afrika agado.

# Grava atentigo el Niĝerio

Mi informas vin, karaj esperantistaj geamikoj, ke oni ŝtelis mian fejsbukan konton. Mi ne plu havas aliron al ĝi pro trompistoj. Se vi eble ricevas ion trompan aŭ fraŭdan nome de Prince Henry Oguinye, tio ne originas de mi, sed de ŝtelistoj.

Nun mi kreis novan konton: *Prince Henry Oguinye-Ozoemena.*



Jam per tiu nova konto ĉe fejsbuko pli ol 200 geamikoj retrovis min. Do vi povas de nun kontakti min per la nova konto kaj mi certe respondos al vi. Dankon.

**Prince Henry Oguinye-Ozoemena**

# Afrikaj kunlaborantoj ĉe «Tutmondaj voĉoj» en Esperanto

Mi invitas legi aŭ diskonigi la ĉi-subajn ligilojn por instigi viajn esperantlingvajn konatojn aliĝi al Global Voices en Esperanto (GVE). Estas jam kelkaj afrikaj kunlaborantoj (el DR Kongo, Madagaskaro), sed ni bonvenigas pliajn por traduki artikolojn pri temoj afrikaj.

Volonte ni ankaŭ akceptas kandidatojn por provelegi jam faritajn tradukojn. Mankas ĉefe homfortoj (precipe kun bonega lingvoscio (kategorio C1 aŭ pli, aprobita de ALTE) por kreskigi la kvaliton, kvanton kaj diversecon de la artikoloj.




Volontuladi en 2021 por GVE: *https://eo.globalvoices.org/2020/01/3944/*

Oftaj demandoj kaj respondoj: *https://eo.globalvoices.org/aligilo-por-gve/lingua*

Partoprenu kaj volontulu! *https://eo.globalvoices.org/2019/07/3039.*

Pioniru kun ni kaj donu plusvaloron al via preferata lingvo: *https://eo.globalvoices.org/2019/03/46*

Bonvenon al niaj tradukistoj: *https://eo.globalvoices.org/bonvenon-al-niaj-tradukistoj*

Aliĝilo al Esperanto Lingua-Tutmondaj Voĉoj : *https://eo.globalvoices.org/aligilo-por-gve*

Ne forgesu sekvi Lingua en Twitter kaj Facebook! [en] kaj Fejsbuko! [eo]. Ni tradukas en dekojn da lingvoj! Finfine abonu la novaĵleteron Global Voices Lingua (en la angla lingvo). Ni havs nian propran novaĵleteron (en Esperanto), kiu aboneblas senpage.

**Herman Deceuninck [dekeŭnink]**

# Zamenhofa Tago en Rutshuru

Ĉio okazis bone en Rutshuru la 15-an de decembro 2020. La rondo esperantista de Kiwanja (REK) sukcesis ricevi la favoron de la estro de la instituto Nyongera, por uzi lian establejon en la komunumo 34a CADAF kiel kunvenejon.

Ankaŭ la vicpastoro de tiu preĝejo/lernejo ĉeestis kaj eĉ partoprenis en la ludamuzado. Joel Muhire parolis pri la historio de Esperanto, disdonis priesperantajn informfoliojn. Kambale Amani Love prelegis pri *Komunikado kaj misinformado* kaj la frato Elie, kiu reĝisoris la tutan programon, faris etan kurson de Esperanto.

Antaŭ ol venis la momento de disiĝo, Kambale Amani Love kun sia kunakrobato prezentis amuzan ĵongladon, kaj ni poste interkonatiĝis per bulĵeta ludo. Ni ĝoje ridis kaj decidis ke tia renkontiĝo estu ofta, almenaŭ unu fojon monate ĝi okazu!

En la centro de Rutshuru, la Esperanto-Klubo Verda Stelano de Honoré Sebuhoro okazigis alian kunvenon kun aparta programo.

**Joel Muhire**



Kelkaj el la kunvenintoj

# ILEI kongresos en Benino

La 54-a kongreso de Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj (ILEI) okazos ne en Edinburgo (Skotlando), sed en la benina urbo Kotonuo. Tiel decidis la Estraro de ILEI en sia kunveno de la 12-a de januaro 2021.

En sia komuniko al komunik-listoj la prezidanto de ILEI, s-ino Mireille Grosjean, klarigas: *Kiel estrarano Yuro Jung (Unika) laboris por prepari nian Kongreson en Edinburgo. Ŝi renkontas tie malfacilaĵojn. La Loka Kongresa Komitato fakte konsistas el nur unu persono, diligenta kaj afabla viro: Ed Robertson. La kongresejo trovita estas la kvakera domo, kiu tamen estus je nia dispono nur ekde lundo matene. Malmendo multekosta kaj postulata jam en majo. Mankas malmultekostaj hoteloj proksime, mankas granda salono por niaj sabataj kaj dimanĉaj programeroj. Devus esti simpozio en kunlaboro kun la grupo de profesoroj kaj esploristoj en la universitato de St Andrews; ĝis nun neniu firma decido pri kunlaboro.*

*Alia malfacila aspekto estas la pandemio. Pro ĝi en la kvakera domo en Edinburgo rajtas sidi nur kvar personoj en salono kun 40 sidlokoj. Plie, kiel ni povis konstati ekde la komenco de la pandemio, neniu povas ion plani. Por organizi kongreson, ni devas plani… Kiel aspektos Edinburgo en julio, neniu povas diri.*

*Pro tio la Estraro en sia kunsido de la 8-a de januaro aludis al… nuligo… aŭ esploro pri nova loko… Ĉu en Eŭropo aliloke? Ne, ĉar la pandemio skuas la tutan Eŭropon.*

*Nova solvo, decido, kiu aperis en plia estrarkunsido la 12-an de januaro: Ni kongresumos en Kotonuo, Benino.*



Hotelo JoCa, la domo de la 54-a ILEI-kongreso

La kongreso okazos de la 7-a ĝis 14-a de aŭgusto 2021 en la hotelo JoCa hibride. Unu el ĝiaj planataj aktivaĵoj estas la dutaga simpozio, kies celo estas emfazi Esperanton kiel lingvistikan studotemon kaj doni impulson al kle-rigado per Esperanto.

Plej diversaj informoj pri Benino legeblas ĉe *www.eo.wikipedia.org* kaj aparta ĉapitro kun la nomo Kotonuo, Benino, *https://mallonge.net/8t*.

Pormemore, en 2008 ILEI havis sian konferencon en la benina ĉefurbo Portonovo.

# Korespondpeto el Kongo

Saluton, mi estas Ndagijimana Justin el DR Kongo. Mi estas komencanto. Mia instruisto estas Joel Muhire, la bofrato. Mi havas 20 jarojn.
Mi volas praktiki Esperanton kun vi kaj aliaj esperantistoj en la mondo. Mi estos kontenta legi vian leteron per: *jsinjoro@yahoo.com*.

***Esperanto en Afriko*** estas trimonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Adjévi Adjé,
06 B.P. 61807, Lomé, Togolando;
tel.: +228 902 57 549, 995 72 623.

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj kompreneble estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *adjevia@gmail.com*.

**Limdato por la 43-a n-ro:** la 15-a de aprilo 2021.

**Membroj de la Afrika Komisiono de UEA (2019-2022):**

S-ino Miora Raveloharison, **Madagaskaro**
S-ro Joel Muhire Ndaziboneye**, DR Kongo**
S-ro Byelongo Elisée Isheloke, **Sudafriko**
S-ro Moses Gbetogo Opa, **Niĝerio**
S-ro Viktor Ntonto, **Kameruno**
S-ro Gilbert Niyukuri, **Burundo**
S-ro Adjévi Adjé, **Togolando**
S-ro Cedrick Irakoze, **Kenjo**

Pli da informoj rilate al la afrika movado haveblas per: ***www.esperanto-afriko.org.***